

Johann Wolfgang von Goethe,

Feliĉa veturo

tradukita de Wilhelm Barnickel

Nebul' disŝiriĝas,
Ĉielo heliĝas.
La timan ligilon
Malnodas Eol'.
Susuras la ventoj,
Ekagas ŝipistoj.
Rapidu! Rapidu!
La ondoj partiĝas,
La for' proksimiĝas.
Vidiĝas la land'.³

...

Johann Wolfgang von Goethe,

Glückliche Fahrt

Die Nebel zerreißen,
Der Himmel ist helle,
Und Äolus löset
Das ängstliche Band.
Es säuseln die Winde,
Es rührt sich der Schiffer.
Geschwinde! Geschwinde!
Es teilt sich die Welle,
Es naht sich die Ferne;
Schon seh ich das Land!

...

Johann Wolfgang von Goethe,

Feliĉa veturo

tradukita de Manfredo Ratislavo

Rompiĝas nebuloj
Sub hela ĉielo,
La timan ligilon
Malligas Eol'.
Susuras la ventoj,
Ekagas ŝipistoj.
Rapide! Rapide!
Disiĝas la ondoj
Kaj alproksimiĝas
La ŝip' al la land'!

...

Johann Wolfgang von Goethe,

Feliĉa navigado

tradukita de Richard Schulz

Nebuloj ŝiriĝas.
Serenas ĉielo.
Timeman rubandon
Malnodas Eol'.⁴
La ventoj klopodas.
Vigliĝas ŝipestro.
Rapide! Rapide!
La ondo disiĝas.
La for' proksimiĝas.
Aperas la land'.

...

³Sinjoro Barnickel origine skribis:

Jam vidas mi land'.

(Sed tie mankas la akuzativa formo "landon".)

⁴Rikardo Ŝulco skribis origine:

Eolo malnodas

Timeman ruband'.

(Sed tio estas gramatike malĝusta. Devus teksti "Timeman rubandon". M. Retzlaff)

*Traduko de la Germana poemo “Glückliche Fahrt” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de WILHELM BARNICKEL (*1921-09-02) en 1983.*

Arg-268-544 (2013-07-20 12:20:36)

Tiun ĉi poem-tradukon sendis al mi, Manfred Retzlaff, en 1984 mia fervojista kolego Willi Barnickel (Tiroler Str. 12b, D-60596 Frankfurt am Main, Germanujo). La lastan linion de la poemtraduko mi, Manfred Retzlaff, provis en 2004-09-09 pliĝustigi; ĉar s-ro Barnickel erare neglektis, ke post la vorto “vidas” oni devus uzi la akuzativan formon “landon”. Kaj la akuzativa finaĵo “-on” ne estas elizebla (ellasebla).

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22).*

Arg-268-540 (2004-09-09 09:10:37)

*Traduko de la Germana poemo “Glückliche Fahrt” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1983-10-13.*

MR.-102-2 / Arg-268-541 (2004-09-09 09:12:59)

*Traduko de la Germana poemo “Glückliche Fahrt” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, *1906-07-12 – †1997-09-26) en 1984.*

Arg-268-542 (2013-02-26 15:11:56)

Tiu ĉi poem-traduko aperis presita en 1984 en la “Vestfaliaj Flugfolioj”, kiun eldonis la konata Esperanto-poeto Rikardo Ŝulco (Richard Schulz), kiam li loĝis en la germana urbo Minden (Minden). La trian kaj kvaran liniojn de la poemtraduko mi, Manfred Retzlaff, provis en 2004-09-09 plibonigi; ĉar Rikardo Ŝulco erare neglektis, ke post la vorto “malnodas” oni devus uzi la akuzativan formon “rubandon”. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz.